**Praha-ek-1955-22-01**

BULTENO DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2

No. 22 Februaro 1955 Aperas laŭbezone

R E Z O L U C I O

akceptita la 10-an de decembo 1954 de la Ĝenerala Konferenco de UNESCO

La Ĝenerala Konferenco, post diskuto de la Raporto de la Ĝenerala direktoro pri la internacia peticio favore al Esperanto,

1. notas la rezultuj atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la interproksimigo de la popoloj;

2. konstatas ke tiuj rezultuj respondas al la celoj kaj idealoj de UNESCO;

3. komisias la Ĝeneralan direktoron plue sekvi la spertojn, kiujn prezentas la utiligo de Esperanto por la edukado, la science kaj la kulturo kaj tiucele kunlabori kun Universala-Esperanto Asocio en ĉiuj aferoj, kiuj interesas ambaŭ organizojn;

4. notas, ke pluraj membroŝtatoj deklaris sin pretaj enkonduki aŭ plivastigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj, elementaj aŭ superaj, kaj invitas tiujn membroŝtatojn Informi la Ĝeneralan direktoron pri la rezultuj atingitaj en tiu rilato.

El revuo ESPERANTO INTERNACIA – januaro 1955

Jen la fruktos de penega laboro de Ivo Lapenna
kaj en la lastaj tagoj de la streĉaj traktadoj
de kunlaboro kun montevideaj samideanoj.
Sed Dro Lapenna ne forgesis ĉeĥoslovakajn esperantistojn
kaj revenante plene elĉerpita tamen trovas tempon
por informi nin pri la granda sukceso.
Lia en Brazilo poŝtigita karto atingis nin la lastan tagon
de la ĵus pasinta jaro. Telegramoj kaj leteroj rapide
anoncis la novaĵon en ceterajn lokojn de la respubliko.
Nian ĝojon ni devis dividi kun la aliaj kaj ankaŭ al ili
agrabligi la starton en la novjaron.
Dankon al vi, kara Ivo Lapenna,
dankon pro la mirinde granda sukceso,
kiu montras al ni novajn perspektivojn!

Josef Vítek

**Praha-ek-1955-22-02**

BULTENO 22-1955

ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkách 26 je la 20a horo. Unu horon pli frue perfektiga kurso gvidata de A. Slanina:

Programo por februaro:

9. 2. MUDr. Frant. Macholda: Mia plej granda amo (pri Pasteur-Instituto en Parizo)

16.2. PhDr. Aug. Pitlik: Antologio de brazilaj rakontoj.

23.2. Dro Pravoslav Sádlo:: La problemo de moderna muziko.

2.3. A. Slanina-Dro Miloš Nývlt: Rememoroj pri Verda Stacio.

9.3. Jaroslav Mařík: Halley kaj lia eltrovo.

VESPERO DE PREMIITAJ KONKURSAĴOJ

En la teatra halo de nia klubdomo estis aranĝitaj jam pluraj prezentadoj en perfekta Esperanto sub gvido de profesiaj artistoj. Inter ili la Vespero de premiitaj konkursaĵoj, okazinta la 16an de decembro honore al naskiĝdato de L. L. Zamenhof, meritas apartan mencion. Enkonduke Eva Suchardová anoncis ekfunkcion de artisma kolektivo de la Esperantista klubo en Praha „Verda Ĉaro de Julio Baghy“ kaj legis la motivojn de tiu faro el letero de J. Baghy, kies dorlotata revo estis tiu ĉi ideo.

En la artvespero estis prezentitaj originalaj verkaĵoj, premiitaj en Internacia Belarta Konkurso de Universala Kongreso de Esperanto 1954; sprita komedieto de Ant. Seeman „Korespondu!“ (ludis la agoro, Eva Suchardová, Dro J. Sucharda, kaj L. Rejhárková el Hradec Králové, membro de EK Praha) kaj unuakta dramo de la sama aŭtoro „Mi esperas“ el la vivo de Dro L. L. Zamenhof. Poemojn de Eli Urbanová „Hodiaŭ ne“, „Riĉa maljunulo“, „Antaŭ spegulo“ kaj sian propran „Letero al proksimo“ recitis Suchardová.

Pensiga estis la ne vasta, sed tre karakteriza oro el la vivo de la Majstro, „Mi esperas“, en kiu li klarigas, por kio li kreis Esperanton kaj kia estas ĝia celo. En liaj vortoj respeguliĝis lia nobla animo. Strange emocie tuŝis nin la sento, kiam ni vidis, je la unua fojo sur scenejo, Lazaron Ludvikon Zamenhof. Jes – ni sentis – tia devis esti la fizionomio de tiu granda viro, tiaj devis esti liaj movoj, tia devis esti lia parolmaniero. Ni sentis, ke la interpretanto de tiu personeco, Dro Sucharda sukcesis. En tio helpis lin ne nur lia arto, sed ankaŭ lia perfekta masko. Same tiel ni povas diri pri la roloj de Suchardová (la edzino de Zamenhof) kaj Seemann (Ant. Grabowski). Ĉe f-ino Rejthárková en la rolo de mallarĝanima onklino de Zamenhof frapis nin ŝia elokventeco en Esperanto. Kunludis ankaŭ virtuoze A. Slanina. Programestro estis Seemann.

Ni kore danku al la artistoj pro la donita ĝuo. Kaj ni bedaŭru tiujn, kiuj ne ĉeestis la programon.

Man.

---

Jam la 25an de novembro 1954 GEEDZIĜIS niaj membroj Eva Nývltová kaj dipl.inĝ. František Řiháček. Multaj klubanoj ĉeestis la solenaĵon kaj en la historia salono de la Malnovurba urbodomo gratulis al ambaŭ novgeedzoj. Same ni esprimas nian sinceran gratulon!

EK Praha

---

MORTIS JAN VENCÁLEK en Přibyslav. Malnova meritplena samideano, kiu dum pli ol 30 jaroj funkciis kiel delegito de UEA mortis subite la 7an de januaro 1955. La enterigo okazis la 10an de januaro. Prof. Jan Filip ĉe la tombo danke rememoris lian entuziasmon por la ideo de Esperanto, per kiu li kontribuis al la interfratiĝo kaj interpaciĝo de la popoloj, kaj adiaŭis lin en nomo de niaj samideanoj. Li ripozu en paco!

---

**Praha-ek-1955-22-03**



BULTENO 22-1955

KARLOVY VARY. Loka Esperantista klubo, nun lingva sekcio de ZR ČSD aranĝas novajn kursojn por komencantoj (Petr Tichota) kaj por progresintoj (Dr. F. Vaněk kaj Fr. Skřivánek). Bangastoj, kiuj vizitas Karlovy Vary el tuta republiko kaj ankaŭ eksterlandaj samideanoj estas bonvenaj gastoj de la klubo. Baldaŭ, kiam niaj grandaj hoteloj estos malfermitaj por gastoj el la tuta mondo, ankaŭ la vizitoj de eksterlandaj esperantistoj estos pli oftaj. Tiurilate ni rememoras la karavanajn vizitojn de danaj (1948), nederlandaj kaj vlamaj (1949) esperantistoj, kiuj moderne ekipitaj per siaj propraj simpatie ornamitaj aŭtobusoj traveturis la ŝtaton! sf.

PLZEŇ aktiva. Ni ricevis invitilon al la Zamenhof-festo, kiu okazis en Plzeň la 17-a de decembro kun eksterordinare riĉa programo. La esperantisto el tiu grava lokon kunvenas ĉiun merkredon je la 19a horo en speciala ĉambro de restoracio Fišer en str. Sedláčkova 39. Konversaciajn kunvenojn gvidas Dro Černý. La junularo sub gvido de Šloufová kaj Hořejší kunvenas samloke ĉiun merkredon je la 18a horo.
TRENČÍN. Nia agema samideano Ján Lamačka (adres. Pod Sokolicami 1675) en la kadro de Agitačné stredisko MERINA, n. e. eldonis unuan numeron de belaspekta informilo NIA SPEGULO.
SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO EN DOKSY festas nunjare dekjaran jubileon de sia instruagado. La kursojn trapasis ĝis nun 1510 esperantistoj. Dum planado de via libertempo ne forgesu kalkuli kun via vizito de SKED!
OLOMOUC. Loka uzina klubo de Hospodářský podnik kunvokis por la 9an de januaro 1955 laborkonferencon, kiun partoprenis 39 delegitoj el Opava, Brno, Svitavy, Karviná, Ostrava, Přerov, Bratislava kaj Trenčín. Estas planita fondo de Konsulta komnato de fakuloj pretaj helpi al la respektivaj kluboj ĉe entreprenoj aŭ klerigaj societoj.
BRNO. Esperantista rondeto ĉe la Domo de Kulturo daŭre preparas por sia membraro vere altkvalitajn programojn, kiel atestas la programplano por januaro – aprilo 1955. La klubvesperoj okazas ĉiumarde je la 19,30 horo en hotelo Slovan (Passage), Lidická 23. Ni sincere gratulas al niaj amikoj en la metropolo de Moravio.
NOVÝ BYDŽOV. Pri Laplando kun filmo kaj diapozitivoj dufoje prelegas la 8an de februaro Josef Vítek.
KARVINÁ-TŘINEC-OSTRAVA. En la tagoj 22. – 24. de februaro okfoje por publiko kaj lernejoj prelegas pri Laplando Josef Vítek. Liajn prelegojn organizas lokajn esperantistoj, s. Milatová, Odehnal kaj Lička.

---

LA MONDO SCIAS PRI NI. Ni trovis en la verko „Posázaví“ gvidlibro tra regiono de Sázava, verkita de Jaroslav Dostál kaj aperinta en Praha 1946 kiel 8a volumo de Biblioteko de ĉeĥaj turistoj, en la nomregistr….pĝ 158, kie oni parolas pri la malgranda vilaĝo Ždánice apud Kouřím, la noton, ke tie naskiĝis en 1896 Ota Ginz, propagandanto de Esperanto.

---

PRI „ESPERANTO V KOSTCE“, la nova malgranda Esperanto-lernolibro de J. Šupichová, publikigas laŭdan recenzon la novembra numero de Laborista Esperantisto, Amsterdam. Mendu la lastajn ekz. po Kč 5,60 ĉe EK Praha.

---

DOMSIGNOJ. Ni ne ĉesos atentigi pri tiu ĉi afero, pri kiu ni parolis jam en nia Bulteno nro 16 kaj 19/20. Se estas en via loko belaj aŭ interesaj domsignoj, vizitu vian Nacian komitaton aŭ lokan

muzeon, se tia ekzistas kaj petu ĝin, ke ĝi liveru materialon (foton kaj ĉeĥlingvan klarigon)al la adreso: Ministerstvo kultury, holandské oddělení, Praha. Laŭ nia opinio ne sufiĉas, se en la preparata verko el Ĉeĥoslovakio estos reprezentitaj sole Praha, Cheb kaj Hradec Králové.

BULTENO 22-1955

KIE VI POVIS LEGI HEROLDON DUM 1954? (Vidu ankaŭ Bultenon nro 15, 16, 17, 19-20). Ropice 159: Josef Poncza – Stonava 14: KarolZipser – Šumbark 25: Fr. Strumínský – Třebíč: Theodor Kilián, Příční 318, Esperanto – Junularo, Dům Osvěty, Gottwaldovo nám. – Třinec: Anna Milatová, Husova 304 – Uherské Hradiště: Růžena Vilémová, Masarykovo nám. 9 – Veselí na Moravě: Jaromír Pavlacký. En Slovakio – Bratislava: Alexander Csáder, Zámočnická 8, Pavol Rosa – Vlčkova 46 – Čakanovce, p. Herľany: Ján Mikloš – Košice: Alojz Kremer, Myslavská 9 – Eugen Matirko – Orlia 4/I – Mikuláš: MgPh Ondrej Hoffmann, nro 25/4 – Martin: Aug. Čambál, Kolonia pri Sokolovni K 3/436, - MUDr Ľud. Izák, Kuzmányho 29, - J. V. Tvarožek, vydavateľstvo Osveta – Nové Mesto nad Váhom: Dr Magda Seppová, Malinovského 955 – Poprad: Milan Neuberer, Širokého 156 – Prakovce: Vlastislav Pindroch – esp. krúžok pri ZKROH – Trenčín: Ján Lamačka, Pod Sokolicami 1675 – Trenčianska Teplá: Jozef Čierny, nro 320. Aldono: Město Teplá, Bohemio: Václav Kryštof, urba aktivisto

ESPERANTO KAJ STENOGRAFIO. La unua Esperanto-alfaro de la ĉeĥa stenografio Herout-Mikulík devenas de Heřman Prokop. Li publikigis sian alfaron-subskribitan per H. P. – en la revuo „Těsnopisné rozhledy", jarkol. XIII, decembro 1934. La aŭtoro okupas 2 ½ pĝ normale presitajn kaj 1 kompletan paĝon aŭtografitan de „Svoj Mi", t. e. Svojmír Mikulík. La aŭtoro mencias en la artikolo fakton al ni ne konatan, ke ankaŭ la Gabelsbergara ĉeĥa stengrafio estis alfarita al Esperanto. Ni trovis utile noti, la publikaĵon antaŭe ne rimarkitan, sed ni konscias, ke la nova Esperanto alfaro de HM-sistemo farita de Adolf Staňura, multe superas tiun ĉi unuan provon.

--

Esperantistoj, veturantaj al Bratislava, partoprenu la ĉiumerkredajn kunvenojn de EK ĉe entreprena klubo de Slovaka Sindikata Konsilantaro. Notu la adreson: ESPERANTSKÝ KRÚŽOK pri ZK SOR – Odborárske nám 3 (19a horo)

--

ESPERANTO EN SKOTLANDO, kies du nroj venis nun hazarde en niajn manojn, alportas ripete kontribuaĵojn de niaj membroj. En septembra nro ni trovis rakonton de Marie Kubátová „Pri la ŝparema Dontino kaj la blanka diablo" en traduko de A. V. Zedník, en tiu de oktobro poemon de Eli Urbanová „Ne multe mankis". Estas honoro por ni, ĉar E. E. S. Distingiĝas inter la E-gazetaro per sia alta nivelo. En oktobra numero tial tuŝis nin la anglismo „deziras kontroli la venton" anst. „mastri" en la cetere bonega rakonto „La kaptito de dio" de Marjorie Boulton.

--

LITERÁRNÍ NOVINY raportis lastatempe pri kelkaj ĉeĥaj literaturaĵoj, aperintaj en diversaj lingvoj per helpo de Esperanto. La legantoj komprenu, ke la cirkostancoj ne permesis mencion de rolo, kiun ludis Esperanto en tiuj publikaĵoj. Oni nepre ne protestu ĉe la redakcio, kiu ne estas kulpa.

--

INTERNACIA KULTURO serĉata, ĉio, kio aperis. Ni pagos aŭ donos interŝanĝe Esperanto-literaturon.

ŠVEJK EN ESPERANTO serĉata, eventuale interŝanĝe por alia Esperanto-literaturo. Proponoj sendu al O. Ginz, Nad cementárnou 10 Praha 15–Podolí.

ĈEĤOSLOVAKIA ANTOLOGIO serĉata. Proponoj al EK Praha.

--

REGULE VIZITADU NIAJN KLUBVESPEROJN KAJ KONTRIBUU AL LA PROGRAMOJ!

----

Venonta numero aperas komence de marto.

Koresponda adreso: Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.